

A photograph of several mushrooms with light brown caps and stems, growing on a thick bed of bright green moss in a forest setting. The background is a blurred green forest.

*Plibonigu la mondon,
komencu per vi mem.*

Kalendaro 2025

45 jaroj Movado sen Nomo 1980 - 2025


Plibonigu la mondon, komencu per vi mem.

Ni rerigardu, kiel estiĝis MOVADO SEN NOMO, fondita en 1938 de pastro Henri de Greeve en Nederlando kiel kristana movado ekster kaj super la preĝejo. Ĉi tio kun la ĉefa celo de kristana inspiro, revivigi kaj efektive apliki la amon al kunhomoj, kiu en nia moderna materiisma mondo preskaŭ nur povas esti reduktita al formalaj ritoj kaj bombastaj frazoj.

Sen ia organizo, administrado aŭ kompenso, la laboro komenciĝis kaj ekkaptis la atenton, unue per paroladoj en radio fare de la fondinto kaj poste per la eldonado de modesta revuo. De ĝia komenco, la movado akiris la atenton de multaj homoj ankaŭ el aliaj kredkomunumoj dum ĝi ampleksigis kaj diversigis sian bonfaran agadon. La dua mondmilito sufokis multajn idealismajn iniciatojn en Eŭropo, inkluzive de la Esperanto-movado. Malgraŭ la tuta kontraŭstaro kaj obstakloj, la fondinto daŭre direktis la movadon ĝis la liberigo en 1944.

En tiu ĉi postmilita epoko aperis pluraj fruktodonaj iniciatoj por helpi la bezonantojn materiale kaj morale, sendepende de iliaj sociaj, politikaj aŭ religiaj konvinkoj. Pro sia senĉesa dediĉo kaj elĉerpiĝo, la pastro de Greve transdonis la gvidadon al W. Loop en 1950, kiu daŭrigis la movadon kun la sama dediĉo. Kontaktoj kun la najbara lando Belgio instigis la starigon en 1965 de simila centro en Antverpeno, kiu kreskus al eĉ pli grava kaj ampleksa movado pere de lia amiko Phil Bosmans. Li, tra siaj multaj karitataj laboroj kaj iniciatoj por la malriĉuloj kaj malpli-bonŝanculoj, kaj tra siaj multaj eldonaĵoj de kiuj cent miloj da kopioj estis distribuitaj kaj tradukitaj en multajn lingvojn, atingis internacian famon.

Phil Bosmans estis plej konata pro siaj levilkartoj, komence publikigitaj en la nederlanda lingvo, sed poste distribuitaj fare de multaj sendependaj naciaj centroj en la franca, la hispana, la germana, la angla, la ĉina, ktp.



Por nomi kelkajn el liaj atingoj, laborejo kaj gastejo por eks-malliberuloj kaj organizo por ciganoj kaj senhejmuloj por doni ŝancon integriĝi en nian socion, same kiel telefonan servon por kuraĝigi homojn en malfacilaj momentoj («Vitaminoj por la Koro»). Tiu ĉi telefoniniciato estis ankaŭ la komenco de la kreado de Movado sen Nomo kaj la disvastigo de tiu “kulturo de la koro” en Esperanto.

Esperantigante ĉi tiun telefonan iniciaton («Vitaminoj por la koro») interkonsiliĝante kun Phil Bosmans, Jos Kerfs havis la ideon plue disvastigi la laboron de Phil Bosmans internacie uzante la Internacian Lingvon! Tio kondukis al la fondo de nia Movado sen Nomo aspc en 1980 sub la sponsorado de Phil Bosmans. Sub la devizo «Plibonigu la mondon, komencu per vi mem!»

La moralo de ĉi tio estas ke, se vi volas fari la mondon pli bona loko, ne atendu ke aliaj prenu la iniciaton, sed plantu tiun semon mem, kiun vi ŝatus vidi kreski al konkreta celo, kiu igas nian mondon pli varma kaj pli humana kaj donas al ĉiuj la ŝancon kreski laŭ siaj kapabloj kaj digno.



**Ni festu
la vivon!**



Januaro 2025 – Ni festu la vivon!

Karaj geamikoj,

Nova jaro alvenis! Ni forgesu la mizeron en la mondo de la pasinta jaro por momento kaj celebru la vivon.

Nia espero estas, ke aferoj pliboniĝos kaj ke la homaro finfine lernos el siaj eraroj. Sed por lerni de nia pasinteco ni devas scii kio misfunkciis tie, ni devas koni nian historion en la ĝusta kunteksto kaj ne reverki ĝin por doni la senton, ke ĝi neniam okazis, ĉar tie la aferoj misfunkcias. Homoj faras erarojn kaj tio ne estas la problemo. Povi konfesi ilin kaj provi eviti, ke ili denove okazu, igas nin pli saĝaj.

Ni daŭrigu tion, kion ni lernis dum la kronviroza pandemio “Se ni kiel homaro kombinas niajn klopodojn kaj laboras kune, ni kapablas alfronti kaj solvi multajn defiojn por elstari kiel vivoformo. Tiel ni povas krei Paradizon kie paco, amo kaj kuneco ligas nin kiel specio en la universo. Ni esperu, ke tio povas fariĝi realo por niaj infanoj kaj por ĉiuj, kiuj venos post ni.

Se ĉiuj volas fari ĉi tion paŝon post paŝo, ni estas sur la bona vojo. Do ni festu! – sed certe ankaŭ ke nia **Movado sen Nomo** festas sian **45-an datrevenon** ĉi-jare kaj ni esperas, ke ni ĉiuj povos daŭre labori por pli bona mondo por la homaro dum longa tempo. Do ni festas amikecon, amon, pardonon, fortikecon, naturon, la varmon de la suno, la bonon en ĉiu el ni, la unuecon kiu igas nin pli fortaj, la potencialon solvi problemojn kaj la kapablon labori en ĉiu diverseco de opinio kaj tamen trovi unu la alian en ĉio, kio kunigas nin, ĉio, kio riĉigas nian scion por fari pli bonan mondon kune. Ni festu la vivon!

Feliĉan novan jaron!

| JANUARO 2025 | | | | | | |
|--------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | | |



Êio komenciĝas per respekto.

Februaro 2025 – Ĉio komenciĝas per respekto.

Etimologie tio signifas «prizorgi kaj konsideri» la respekton aŭ aprezon, kiun oni havas aŭ ricevas por iu aŭ io pro la kvalito, agado aŭ lerteco, kiun iu elmontras.

Eĉ se vi ne kundividas la opinion aŭ vidpunkton, gravas, ke vi lasu la alian personon en lia aŭ ŝia digno. La alia persono ankaŭ havas siajn meritojn kaj bazon por sia konvinkigo. Same vi atendas respekton de iu alia por via vizio. Esence estas, ke respekton oni meritas gravas tiuj du vortoj kune. Respekto kiu estas ordonita ne meritas ĉi tiun terminon.

Sen respekto al nia oponulo, ni malofte aŭ neniam atingos reciprokan respekton.

La koncepto RESPEKTO estas la bazo por ĉiu interligo, ĉu en politika aŭ komerca sfero, rilato, geedzeco aŭ amikeco, kie ni trovas ĝin evidenta. Sed respekto ankaŭ estas la bazo, kiu devus esti la fundamento por ĉiu paŝo, kiun ni faras en niaj vivoj, inkluzive de niaj oponuloj (aŭ malamikoj), kiuj meritas respekton. Finfine, ili ĉiuj estas karnaj homoj kun sia familio, socia kaj kultura medio kaj fonoj. Malgraŭ malsamaj kredoj kaj kutimoj, anstataŭ konflikto, respektema proksimiĝo povas esti la ŝlosilo al dialogo kaj interkompreniĝo.

Kaj pensu pri la medio kaj la naturo, kun kiom da respekto vi traktas ilin?!

| FEBRUARO 2025 | | | | | | |
|---------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | | | 1 | 2 |
| 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 |
| 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 |
| 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 |
| 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | | |



***Kiun vi vidas...
en la spegulo?***

Marto 2025 – Kiun vi vidas en la spegulo?

Ni ne parolos pri vanteco. Bone, vi estas bravulo, sed ni iros iom pli profunden ol via reflektado sur la surfaco de tiu spegulo. Rigardu tra tiun reflektan surfacon kaj faru iom da memreflekto.

Kaj rigardu la internan mion kaj malkovru, kiu vi vere estas kaj kiu vi ŝatus esti. Kaj? Ĉu al vi plaĉas? Demandu vin: "Ĉu mi fartas bone kaj kiel tiuj ĉirkaŭ mi spertas min?" Ĉu mi estas la persono, kiun mi ŝatus renkonti kaj dezirus kiel amikon ... aŭ kiel partneron, kolegon aŭ funkciulon?

Vi povas starigi al vi la saman demandon, kiam aliaj kritikis aŭ flankenmetas vin. Ĉu la kritiko estas trafa kaj pravigebla aŭ ĉu ĝi estas senbaza? Foje homoj faras tre dolorajn akuzojn kaj foje ili estas pravigeblaj, sed ofte ne. Foje ili celas nur vundi, ĉar ili estas koleraĵoj aŭ deziras atenton pro ia frustrigo.

Provu demandi vin kial homoj reagas tiel kaj ĉu la komentoj aŭ akuzoj estas trafaj. Ĉi tio ofte kontribuas al via memfido kaj memscio, ĉar vi analizas situaciojn kaj vi pli bone ekkonas vin. Ankaŭ nia ĉirkaŭaĵo ofte funkcias kiel spegulo. Tiel vi lernas reagi malpli impulse kaj vi akiras pli da kontrolo pri kiu vi estas kaj ŝatus esti kaj ĉu vi volas ĝustigi vian sintenon aŭ konduton.

La vivo senĉese testas vin per tiom da aferoj, kiuj igas vin dubi pri ĉio kaj ĉiuj.

Se vi regas ĉi tiun reflekson, vi fariĝos multe pli ekvilibra kiel persono kaj vi eble vidos pli de la persono, kiu vi volas esti dum via reflektado.

| MARTO 2025 | | | | | | |
|------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | | | 1 | 2 |
| 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 |
| 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 |
| 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 |
| 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 |
| 31 | | | | | | |



***La mano kiu donas,
neniam estas malplena.***

Aprilo 2025 – La mano, kiu donas, neniam estas malplena.

Oni foje diras, ke la vivo estas donado kaj prenado. Alivorte: « mi donas, kaj do mi re-ricevu ». Homoj ofte havas la emon alproprigi al si aferojn. Ili opinias, ke ili rajtas fari tion, kaj materiisme, tio povas funkcii, sed el homa perspektivo ne funkcias tiel: respekton kaj aprezon oni devas meriti.

Vi ne povas devigi iun ami vin aŭ esti ilia posedaĵo. Tiam oni vivas en iluzio aŭ en diktaturo, kie mankas la tuta homeco.

Ni dividas nian ĝojon, nian amikecon kaj nian manĝaĵon kaj trinkaĵon kun niaj amatoj. Eĉ nian domon kaj nian aŭton kaj havaĵojn ni volonte dividas kun niaj amikoj. Estas facile kunhavigi kun tiuj, kiuj estas proksimaj al niaj koroj aŭ ene de niaj komfortaj zonoj. En nia disigita socio ni rapide komencas fari distingojn kaj ni foje fariĝas tre elektemaj rilate al nia kompato kaj fermas nin al tio, kion faras aliaj. Tamen, ĉiu persono havas sian propran historion kaj ĝi povas esti fascina kaj eduka. Eble vi ricevos multe da varmo kaj saĝo kaj eble eĉ amikeco interŝanĝe al la atento kiun vi donas aŭ tio kion vi dividas.

Ni devus pli konscii, ke riĉeco ne tiom rilatas al materiaj aferoj, sed al nia valoro « esti homa ». Se vi sentas, ke homoj aprezas kaj respektas vin, vi multe pli facile malfermiĝas al aliaj, kaj via malavareco revenas pluroble. Certe estus malpli da soleco kaj mizero en la mondo, se ni havus pli da atento kaj kompreno unu por la alia, sendepende de la deveno, socia klaso aŭ medio.

Kion vi donas el via koro, vi kutime ĉiam rricevas en unu maniero aŭ alia, eĉ se estas tra la plezuro ke vi povis signifis ion por iu. Se ne pleniĝas via mano, eble pleniĝas via koro.

| APRILIO 2025 | | | | | | |
|--------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
| 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
| 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 |
| 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 |
| 28 | 29 | 30 | | | | |

A close-up photograph of a sandy beach littered with numerous seashells of various sizes and colors, including white, tan, and brown. The shells are scattered across the sand, some partially buried. The lighting is bright, creating soft shadows. The text is overlaid in the center of the image.

Indiferentemmo:
kancero de la
sentimento.

Majo 2025 – Indiferentemo: kancero de la sentimento.

Indiferento estas nemeritita plago por via proksimulo. Ĝi reprezentas senkorecon, nesentemon, malvarmon, egoismon: ĝi izolas. Ĝi estas signo de regreso, de misevoluo, de velko de la sentivo.

Indiferentemo estas kancertumoro je la humaneco kaj la homaro.

Bonvolu konsideri kiom da fojoj vi nekonscie ofendis amikon aŭ kunulinon per via indiferento.

Provu kontroli kiom da fojoj vi, indiferenta, ion aranĝis iel ne atentante pri la aliaj homoj. Se pro tia konduto tiuj trafas en malagrablan situacion, ne sufiĉas poste diri al ili mispente: «Kia malbonŝanco!» Tiaj vortoj nek konsolas, nek kompensas. Malgraŭ via «Mi bedaŭras», oni opinios vin senpripensa persono, egoisma kaj indiferenta.

Konsideru kiel agrable estas konstati, ke iu en sia agado konsideras vin. Tiam montriĝas, ke vi gravas; ke oni havas kaj kovas por vi sentojn de respekto, komprenemo, indulgo kaj mildeco. Ni ne akceptu la subfosadon de tiaj sentimentoj pro indiferento. Ni ne permesu, ke nia kompatpovo kadukiĝu; ke nia sentivo kripliĝu.

Ankaŭ vi ŝatas aŭdi laŭdajn vortojn pri via laboro, via helpemo, via bonhumoro kaj afableco. Kial do vi ne regalus la busŝoforon, la profesorinon, aŭ la kuiriston de la restoracio, aŭ vian kunulon, per tiuj laŭdaj vortoj?

Ĉu ĉar estas normale, ke ĉiu plenumu sian taskon? Sed kial ne ĝojigi kaj kuraĝigi aliajn per aprobo, kiam eblas? Ne cedu al indiferentemo!

Ekzilu la indiferecon kaj malkovru, kiom via ĉirkaŭaĵo pligajiĝas sen ĝi.

| MAJO 2025 | | | | | | |
|-----------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | 1 | 2 | 3 | 4 |
| 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
| 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 |
| 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 |
| 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | |

Papilion oni ne kaptas



kun fermita mano.

Junio 2025 – Papilion oni ne kaptas kun fermita mano.

De ĉasisto-kolektanto al farmisto kaj esploristo. Ni faris longan vojon en nia evoluo, sed ŝajne ankoraŭ konservas prajjn instinktojn en nia DNA. Oni povas starigi la demandon: kion ni lernis el nia historio? Ni estas tiel fortaj en evoluigado de sistemoj kaj teknikoj, kiuj faciligas nian vivon, ni vojaĝas al la luno, esploras la kosmon, ni elstaras kaj konstante puŝas niajn limojn kaj ni daŭre solvas la sekretojn de la vivo.

Tamen, se temas pri niaj homa interago kaj kompreno, aferoj ofte misfunkcias kaj ni ŝajne malfacile lernas. Ni daŭre provas kontroli, kondiĉi, manipuli kaj direkti homojn kiel maŝinojn. Sed ni havas liberan volon, kiu donas al ni la elektojn por decidi la vojojn, kiujn ni volas iri. Ĉu estas tiel malfacile lerni el la eraroj de nia pasinteco kaj konstati, ke se ni kunlaboras en respekto kaj harmonio por paca mondo, ni profitos kiel homaro?

Ĉu ni tiom ŝatas esti manipulitaj aŭ direktitaj? Aŭ ĉu temas pri maldiligento? Ni distanciĝu de la manipulantoj kaj diktatoroj, ni donu la manon unu al la alia kaj konservu nian liberecon. Ne plu ni lasu nin kaptiĝi de timo kaj kredemo, aŭ de mano, kiu provas fermiĝi ĉirkaŭ ni. Ni estu kiel la papilio kiu povas surteriĝi sekure sur la malfermita manplato kiu estas prezentita.

| JUNIO 2025 | | | | | | |
|------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | | | | 1 |
| 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 |
| 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 |
| 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
| 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 |
| 30 | | | | | | |



Vi ne povas haltigi la ondojn, sed vi povas lerni surfi ilin.

Julio 2025 – Vi ne povas haltigi la ondojn, sed vi povas lerni surfi ilin.

Ni vivas en malkvieta socio kiu evoluas kaj ŝanĝiĝas rapide. Normoj kaj valoroj ŝajne daŭre ŝoviĝas kaj la socia premo por « sukcesi en la vivo » pliiĝas. Pli kaj pli ofte oni referencas al rolmodeloj.

Pli-malpli ĉiuj plenkreskuloj ĝenerale spertas ĉi tiun premon. Adolekantoj tion spertas eĉ pli intense. Por multaj junuloj malfacilas rigardi aferojn en perspektivo; ili ankoraŭ ne kapablas vidi la ĝustan kuntekston. Oni imagas sin sur sovaĝa maro.

Ni malofte aŭ neniam povas venki kontraŭ naturaj fortoj, sed ja eblas lerni antaŭvidi kaj vivi en harmonio kun ili! Ne estos facile, sed post kiam vi regos la kapablojn, vi lernos ludi per ili, vi sentos la ŝvelaĵon kaj la ritmon kaj drivos en harmonio kun la ondoj de la vivo kun ĉiuj iliaj pintoj kaj valoj. Estas mem-evoluo, kiun vi devas lerni paŝon post paŝo per provado kaj erarado dank' al ĉiuj spertoj kiujn vi akiras kaj ricevas en la vivo.

| JULIO 2025 | | | | | | |
|------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
| 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
| 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 |
| 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 |
| 28 | 29 | 30 | 31 | | | |

*La vivo estas kiel spegulo...
ridetu, kaj vi rericevos rideton.*



Aŭgusto 2025 – La vivo estas kiel spegulo... ridetu, kaj vi ricevos rideton.

Ĉu vi iam havis unu el tiuj tagoj, kiam nenio funkcias kaj vi ne emas fari ion ajn? Tiam vi povas fari du aferojn: rampi en angulon kaj atendi ĝis la tago finiĝas – aŭ decidi male: ridi kaj fari ion alian, kiel ekzemple fari promenon. Sciu, ke la malbona humoro pasos.

Kovi deprimajn sentojn nenio ŝanĝiĝas, male vi eniras negativan spiralon, kiu ne helpas vin antaŭeniri. Necesas iom da penado por ŝanĝi tiun humoron kaj reakiri pozitivan humoron. La arto de la vivo estas ĉiam resti pozitiva kaj provi ĝui ĉiun momenton, eĉ se aferoj ne tiel bone iras. La vivo estas tro mallonga por ne profiti ĝin. Ĉi tio estas precipe grava mense: se vi estas forta, tiam vi estos multe pli rezistema al malsukcesoj.

Ne kreu negativan etoson ĉirkaŭ vi, kiu izolas vin de via ĉirkaŭaĵo kaj de vi mem. Viaj proksimuloj reagos multe pli pozitive kaj helpeme se vi mem estas gaja kaj amika. Tio estas kontaĝa al aliaj!

Admiron por ĉiuj tiuj, kiuj estas en konfliktejoj kaj mizero kaj ankoraŭ vidas la pozitivajn aferojn en la vivo aŭ volas daŭre kredi je ili. Kiel homoj, ni estas kreemaj kaj empatiaj estaĵoj kaj tio faras nin pli fortaj en supervivado. Kiom ajn malhela, la suno ĉiam brilos - eĉ se vi ne vidas ĝin. Se vi ridos pri la vivo, vi tre verŝajne baldaŭ ricevos rideton... kaj ĝojos.

| AŬGUSTO 2025 | | | | | | |
|--------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | | 1 | 2 | 3 |
| 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
| 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 |
| 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 |
| 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 |

A sunset over a body of water with an industrial skyline in the distance. The sky is filled with orange and yellow clouds, and the sun is partially obscured by a large, dark cloud. The water is dark blue with some ripples. In the background, there are silhouettes of industrial buildings and cranes. The text "Ali-pensantoj" is written in a stylized, red, italicized font with a black outline, positioned in the upper half of the image. The text "... ankaŭ pensas." is written in the same style, positioned in the lower half of the image.

Ali-pensantoj

... ankaŭ pensas.

Septembro 2025 – Ali-pensantoj ... ankaŭ pensas.

La daŭre evoluanta disvastiĝo de modernaj amaskomunikiloj kiel interreto, sociaj amaskomunikiloj, televido, radio, filmo kaj gazetaro, ebligas al ni pli profunde konsciiĝi pri la ekzisto de aliaj opinioj, moroj aŭ kulturoj. La amaskomunikiloj nuligas distancojn, reciproke alproksimigas homojn kaj popolojn.

Ĉiuj homgrupoj, etnaj aŭ politikaj, havas proprajn ideosistemojn, kiujn kaŭzis la materiaj vivkondiĉoj, moroj kaj tradicioj, kulturaj heredaĵoj aŭ la ekonomia kaj politika agadirektoj de la nacio, al kiu tiuj popoloj apartenas. Sekvas el tio, ke iu specifa komunikaĵo havas alian efikon, depende de la pensmaniero de la informato. Iu ideo povas havi por malsamaj individuoj aŭ popoloj tute alian valoron.

La opiniformado de homo dependas de ties aparta pensmaniero. Bedaŭrinde, ekzistas multaj supraĵaj onidiroj kaj antaŭjuĝoj, ĉar oni ne atentis pri la fono de la pensado. Sed, ĉu supraĵaj onidiroj kaj antaŭjuĝoj nur dependas de ies vivocirkonstancoj?

Konsideru ĉu ni ankoraŭ estas apertaj por aliaj pensmanieroj, aŭ ĉu ni tuj kondamnas tiujn? La ekzameno de iu opinio ne signifas, ke oni devas akcepti ĝin, sed ĝi povas pligrandigi nian komprenpovon. Se ni povas kompreni la motivojn de la agoj kaj ideoj, kiuj ŝajnas al ni tiel malkonvenaj, tio povus esti plia paŝo al reciproka komprenemo kaj humaneco.

| SEPTEMBRO 2025 | | | | | | |
|----------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 |
| 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 |
| 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 |
| 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 |
| 29 | 30 | | | | | |

A black and gold braided rope is laid out on a light-colored wooden surface. The rope is coiled into a large, irregular shape. In the center of the coil, there is a tassel made of yellow and black threads. The text "Kontaktó sen takto =" is written in red, bold, sans-serif font across the upper part of the rope.

Kontaktó sen takto =

fuŝkontaktó.

Oktobero 2025 – Kontakto sen takto = fuŝkontakto.

Kontakto de homoj kun homoj. Kontakto ankaŭ kun aliaj homoj ol tiuj, kiuj ĉirkaŭas vin ĉiutage. Kontaktoj kun homoj malsamideanaj, de ĉiuj haŭtkoloroj, trans ĉiun limon. La unua kontaktigilo inter la homaro estas la vorto. Ĝi havas grandan povon, ĉar ĝi povas negative aŭ pozitive influi la aŭskultantojn. Tial ege gravas zorge elekti ĉiun eldiritan vorton.

Bonaj kontaktoj kreas lumon, ĝojon kaj amikecon, alportas pacon al ĉiuj homoj kaj popoloj. Kiam nia koro plenas je simpatio kaj kompato, ne preterpasas niajn lipojn vortoj de kolero aŭ malamo. Tiam la de ni elparolitaj vortoj ĉiam estos vortoj de paco kaj saĝeco.

Takto estas delikatsenteco, respekto kaj atentemo. Takto lasas la alian esti kia li aŭ ŝi estas, kaj bonvenigas lin aŭ ŝin. Takto disradias nur pozitivaĵojn, lumon, por ne esti ĝeno, sed helpilo al la homoj. Ĝi priatentas la feliĉon de ĉiuj homoj, kaj tial ĉirkaŭigas ĉiujn homojn per amo, ĝojo kaj simpatio.

Atentu pri la fuŝkontaktoj! Jam sufiĉe mallumas en la mondo.

| OKTOBRO 2025 | | | | | | |
|--------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | | |

A photograph of a small waterfall in a forest. The water is cascading over several large, moss-covered rocks. The surrounding area is lush with green ferns and fallen brown leaves. The text is overlaid in the center of the image.

**Amo ne devas
esti perfekta,
ĝi devas esti
reala!**

Novembro 2025 – Amo ne devas esti perfekta, ĝi devas esti reala!

Ni ĉiuj serĉas la idealan, la perfektan, la finfinan feliĉon.

Tio estas bela, sed nur malofte ni trovas tiun perfektecon. Ni postulas tiun perfektecon de aliaj, sed ĉu ni mem tiel perfektas? Se vi estas honesta kaj realisma, ni neniam trovos tion 100%-e kaj tiam ni scias, ke kompromisoj estas necesaj.

Estas bona ŝanco ke, se ĉio estus ĉiam perfekta, tio rapide enuigus nin. Estas nenio pli amuze ol surpriziĝi de tempo al tempo, farante ion ekster nia komforta zono, por puŝi niajn limojn. Ĉu ne multe pli interesas la amo, se oni regule incitas vin? Kelkfoje tio estos agrable, foje estos malpli, sed ankaŭ ni havas bonajn kaj malbonajn tagojn, same kiel ĉiuj.

Se la amo estas reala, vi akceptas ĝin de la alia persono, ĉar ankaŭ ili akceptas ĝin de vi. Vi povas revii, sed vi devas resti realisma. Tamen, rilato en kiu vi povas esti vi mem estas multe pli valora ol io alia kaj ankaŭ montras veran amon, ĉu temas pri amikeco aŭ amrilato. Tiam vi povas diri, ke amo estas preskaŭ perfekta.

| NOVEMBRO 2025 | | | | | | |
|---------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| | | | | | 1 | 2 |
| 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 |
| 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 |
| 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 |
| 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 |

Spaco... por paco.



Decembro 2025 – Spaco... por paco.

Toleremo necesas por paco!

Certe, ankaŭ vi deziras pacon.

Do, kiel vi povas helpi krei pacon, vi eble demandas vin? Paco nur eblas, se ĉiuj homoj akceptas unu la aliajn. Ĉar neniu homo povas ŝanĝiĝi komplete, ni devas lerni toleri.

Ni devas akcepti la tipajn ecojn de la aliaj homoj. Ĉiu homo havas siajn proprajn sentojn kaj pensojn kaj tio devas esti respektata. Se ni toleras la diversecon inter la homoj ni ĉiuj povas vivi kune en paco.

Diversaj popoloj, diversaj religiaj grupoj kaj ĉiaj diversaj individuoj trankvile vivos unu kun la alia. Ili facile akceptos aliajn vivmanierojn, aliajn ideojn, ĉar ili klopodas—per sia toleremo — kompreni siajn apudulojn.

Konsciu, ke via najbaro ne estas kiel vi (aŭ kiel vi volas, ke li estu) kaj simple akceptu, ke li estu si mem. Se vi toleras, vi instigas viajn apudulojn fari same, kaj per tio vi disvastigas la toleremon.

Toleru ĉiujn aliajn, donu al ili spacon kaj montru, ke vi vere volas pacon!

| DECEMBRO 2025 | | | | | | |
|---------------|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| LUN | MAR | MER | ĴAŬ | VEN | SAB | DIM |
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 |
| 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 |
| 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 |
| 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 |
| 29 | 30 | 31 | | | | |

Planado-kalendaro por 2025

| JANUARO | FEBRUARO | MARTO | APRILIO | MAJO | JUNIO |
|----------------|-----------------|--------------|----------------|-------------|--------------|
| 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 |
| 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 |
| 4 | 4 | 4 | 4 | 4 | 4 |
| 5 | 5 | 5 | 5 | 5 | 5 |
| 6 | 6 | 6 | 6 | 6 | 6 |
| 7 | 7 | 7 | 7 | 7 | 7 |
| 8 | 8 | 8 | 8 | 8 | 8 |
| 9 | 9 | 9 | 9 | 9 | 9 |
| 10 | 10 | 10 | 10 | 10 | 10 |
| 11 | 11 | 11 | 11 | 11 | 11 |
| 12 | 12 | 12 | 12 | 12 | 12 |
| 13 | 13 | 13 | 13 | 13 | 13 |
| 14 | 14 | 14 | 14 | 14 | 14 |
| 15 | 15 | 15 | 15 | 15 | 15 |
| 16 | 16 | 16 | 16 | 16 | 16 |
| 17 | 17 | 17 | 17 | 17 | 17 |
| 18 | 18 | 18 | 18 | 18 | 18 |
| 19 | 19 | 19 | 19 | 19 | 19 |
| 20 | 20 | 20 | 20 | 20 | 20 |
| 21 | 21 | 21 | 21 | 21 | 21 |
| 22 | 22 | 22 | 22 | 22 | 22 |
| 23 | 23 | 23 | 23 | 23 | 23 |
| 24 | 24 | 24 | 24 | 24 | 24 |
| 25 | 25 | 25 | 25 | 25 | 25 |
| 26 | 26 | 26 | 26 | 26 | 26 |
| 27 | 27 | 27 | 27 | 27 | 27 |
| 28 | 28 | 28 | 28 | 28 | 28 |
| 29 | | 29 | 29 | 29 | 29 |
| 30 | | 30 | 30 | 30 | 30 |
| 31 | | 31 | | 31 | |

Planado-kalendaro por 2025

| JULIO | AŬGUSTO | SEPTEMBRO | OKTOBRO | NOVEMBRO | DECEMBRO |
|-------|---------|-----------|---------|----------|----------|
| 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 |
| 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 |
| 4 | 4 | 4 | 4 | 4 | 4 |
| 5 | 5 | 5 | 5 | 5 | 5 |
| 6 | 6 | 6 | 6 | 6 | 6 |
| 7 | 7 | 7 | 7 | 7 | 7 |
| 8 | 8 | 8 | 8 | 8 | 8 |
| 9 | 9 | 9 | 9 | 9 | 9 |
| 10 | 10 | 10 | 10 | 10 | 10 |
| 11 | 11 | 11 | 11 | 11 | 11 |
| 12 | 12 | 12 | 12 | 12 | 12 |
| 13 | 13 | 13 | 13 | 13 | 13 |
| 14 | 14 | 14 | 14 | 14 | 14 |
| 15 | 15 | 15 | 15 | 15 | 15 |
| 16 | 16 | 16 | 16 | 16 | 16 |
| 17 | 17 | 17 | 17 | 17 | 17 |
| 18 | 18 | 18 | 18 | 18 | 18 |
| 19 | 19 | 19 | 19 | 19 | 19 |
| 20 | 20 | 20 | 20 | 20 | 20 |
| 21 | 21 | 21 | 21 | 21 | 21 |
| 22 | 22 | 22 | 22 | 22 | 22 |
| 23 | 23 | 23 | 23 | 23 | 23 |
| 24 | 24 | 24 | 24 | 24 | 24 |
| 25 | 25 | 25 | 25 | 25 | 25 |
| 26 | 26 | 26 | 26 | 26 | 26 |
| 27 | 27 | 27 | 27 | 27 | 27 |
| 28 | 28 | 28 | 28 | 28 | 28 |
| 29 | 29 | 29 | 29 | 29 | 29 |
| 30 | 30 | 30 | 30 | 30 | 30 |
| 31 | 31 | | 31 | | 31 |

| Januario 2026 | | | | | | | Februario 2026 | | | | | | | Martio 2026 | | | | | | |
|---------------|----|----|----|----|----|----|----------------|----|----|----|----|----|----|-------------|----|----|----|----|----|----|
| L | M | M | Ĵ | V | S | D | L | M | M | Ĵ | V | S | D | L | M | M | Ĵ | V | S | D |
| | | | 1 | 2 | 3 | 4 | | | | | | | 1 | | | | | | | 1 |
| 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 |
| 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 |
| 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
| 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 |
| | | | | | | | | | | | | | | 30 | 31 | | | | | |
| Aprilo 2026 | | | | | | | Majo 2026 | | | | | | | Junio 2026 | | | | | | |
| L | M | M | Ĵ | V | S | D | L | M | M | Ĵ | V | S | D | L | M | M | Ĵ | V | S | D |
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | | | | | 1 | 2 | 3 | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | | | | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | 29 | 30 | | | | | |

| Julio 2026 | | | | | | | Agusto 2026 | | | | | | | Septembro 2026 | | | | | | |
|--------------|----|----|----|----|----|----|---------------|----|----|----|----|----|----|----------------|----|----|----|----|----|----|
| L | M | M |  | V | S | D | L | M | M |  | V | S | D | L | M | M |  | V | S | D |
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | | | | | | 1 | 2 | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | | | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 28 | 29 | 30 | | | | |
| | | | | | | | 31 | | | | | | | | | | | | | |
| Oktobro 2026 | | | | | | | Novembro 2026 | | | | | | | Decembro 2026 | | | | | | |
| L | M | M |  | V | S | D | L | M | M |  | V | S | D | L | M | M |  | V | S | D |
| | | | 1 | 2 | 3 | 4 | | | | | | | 1 | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
| 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
| 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 |
| 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 |
| 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 28 | 29 | 30 | 31 | | | |

Jen la originalaj levilkartoj kiujn ni reprenis por tiu ĉi kalendaro:



Movado sen Nomo aspc.
Lange Beeldekenstraat 169
2060 Antwerpen (Belgio)

IBAN: BE75 9796 0877 6651 – BIC: ARSP BE22
<https://esperanto.be/msn>